

Malgranda Biblioteko de "Itala Esperanta Revuo"
Sub patronado de Itala Katedro de Esperanto

ARTURO GHEZ

Vi sola, Esperanto,
povas fari
tiajn miraklojn!

Unuakta originala teatraĵo

Premiita ĉe la X-aj Internaciaj Floraj Ludoj



A. PAOLET, Eldonanto
S. VITO AL TAGLIAMENTO

1924

Malgranda Biblioteko de "Itala Esperanta Revuo",
Sub patronado de Itala Katedro de Esperanto

ARTURO GHEZ

Vi sola, Esperanto,
povas fari
tiajn miraklojn!

Unuakta originala teatraĵo

Premiita ĉe la X-aj Internaciaj Floraj Ludoj



A. PAOLET, Eldoninto
S. VITO AL TAGLIAMENTO

1924

Kun permeso
de Kataluna Esperantista Federacio.



P E R S O N O J

MEMO, fama pentristo.

NANDO, glora muzikisto.

FILOMENA, ĉambroluistino.

JOHN REIGHT ĈING SPIC PUNK, amerika
milionulo.

MONBIJOU, kabaredulino.

[MALLONGIGOJ: *Memo M.* — *Nando N.* — *Filomena F.* — *John J.* — *Monbijou Mb.*].

MEMO : okuloj plenaj de mensogoj, lipoj ĉiame flategemaj, nazo provokanta, manoj de nenionfarulo. Je la aĝo de dek ses jaroj, li forlasis la gepatran domon dirante ke li sentis la alvokon de la arto. Neniu kredis al li, escepte la pordistino, kiu ĵuris ke ŝi estis vidinta la arton, kaj rakontis ke ŝi estis blonda, eleganta, ŝnela, vestita per lazura robo kaj dancis ĉe Maxim. Memo per sia peniko perlaboris ĉefverkojn, kiujn la malklera popolaĉo neniam kapablis ŝati kaj, plimalbone, neniam volis aĉeti. En la cerbo de Memo kuŝas nur unu penso, kiu maltrankviligas lin tage kaj turmentas lin nokte ; tiu penso estas nomata : virino.

NANDO : frunto de juna dio, hararo de artisto, vizaĝo de knabino, okuloj de revo. Lia gitaro falstonas, sed ne falstonas la kordoj de lia koro kantantaj ĉiame frenezan melodion, en kiu moviĝas virinoj kun rigardoj koketlogaj, ŝultroj nudaj kaj provokantaj, parfumoj ebriigantaj, ekvidoj donantaj la kapturniĝon. La nura neperfektaĵo de Nando estas la malriĉeco ; tamen li havas ĉiam la esperon fariĝi milionulo kaj tiam efektiviĝi sian egan revon : konstrui grandan ĝardenon plenan de ombroj delogemaj kaj misterplenaj anguloj ; vilaon blankan kun fantaziaj ĉambretoj plenaj de molaj tapiŝoj, orumitaj speguloj, voluptaj pentraĵoj, tabloj plenegaj de floroj kaj glasoj ŝaŭmantaj. La eniro estus libera al ĉiu, kin deziros esti feliĉa.

MONBIJOU : Ŝi estos trovebla ĉiunokte en Alhambra inter aro da nigraj frakoj kaj oraj kalikoj. En ŝiaj okuloj estas skribite, volupto ; sur ŝiaj lipoj, kisoj. Ŝi havas la koron tiom grandan ke en ĝi estas loko por ĉiuj : ri-

ĉuloj kaj malriĉuloj, kaj estu certaj ke se grafo de Montefiorito faligis en ŝian monujon dek orajn mone-rojn, ties kvin, minimume, flugos en la mizeran mansardon de artisto, kiun ŝi, per ĝentila mensogo, petos pentri sian bildon, envolvitan per simpla vualo, kaj tio por ne perdi poste tro da tempo sin senvesti.

FILOMENA: sufĉas la nomo: vidvino, ĉambroluistino, iomete avara, iomete religiema, tial iom voluptema. Ŝi ĵuras ke ŝia edzo estis unu el ŝiaj unuaj amoj kaj ke ŝi revidas lin ĉiunokte en songo sentante paradizajn voluptojn, kompareblajn nur kun la « triple sec ». La artistoj, kiuj loĝas en ŝia domo, estas bonegaj junuloj; ili portas hejmen la ĝojon, sed bedaŭrinde ne portas monon, eĉ ili havas la senhonton peti pruntojn. Ŝi pruntedonis malmulte kaj malofte kaj la pruntita mono revenis domen kiam la malgranda kalendaro pendigita en la kuirejo devis malaperi por lasi sian lokon al la kunfrato de la venonta jaro. Nuntempe ŝi ne pruntedonas plu, krom kontraŭ multekosta garantiaĵo kaj tio ankaŭ pro la cirkonstanco ke ŝi perdis preskaŭ ĉiujn esperojn trovi alian edzon, al kiu ŝi estus preta ĵuri senfinan amon.

JOHN REIGHT ĈING SPIC PUNK. Li alvenis antaŭ ne-longe el Porkopolis (Usono). Je la 20 de tridek jaroj li anstataŭis sian patron, kies li estis la sola heredanto de la grandaj fabrikejoj por la eksportado de porka viando. Li havas egan krediton eĉ la borsoj de Nova Jorko kaj Londono. La pasintan vintron lia nomo kuradis tra ĉiujn tridekkvin ŝtatojn de la stelita flago pro giganta reklamo farita de sia firmo: dum bela mateno la pacemaj civitanoj de Porkopolis havis la agrablan surprizon vidi plui dum tri horoj tioma aro da kolbasoj ke ĉiuj vojoj

en mallonga tempo estis kovritaj. Kaj certe tiu benita pluvo estus longtempe daŭrinta, sed la polico, timante ke pro trouzo la popolo ne malsaniĝu, estis devigata ĝin malpermesi.

Pro la nuna malpermeso trinki alkoholaĵojn, sir John Spic vendis siajn fabrikejojn kaj sen zorgoj kaj negocoj venis al Eŭropo por trovi la virinon, kun kiu li korespondis dum unu monato. Li estas iom laca kaj esperas ke la trinkado de alkoholaĵoj kaj la edziĝo redonos al li energion kaj pacon.

SCENEJO.

Malluksa ĉambreto : en la mezo stablo kun supre nefinita pentraĵo ; dekstre malnova kanapo kaj du difektitaj seĝoj ; sur la parietoj pecoj de papero kaj tolo kun desegnaĵoj. Kiam la kurteno supreniras, Memo pentras kaj Nando ludas la gitaron.

SCENO I^a

M. Nando, mi ne povas plu labori hodiaŭ : la penso pri la balfestoj min turmentas tro multe.

N. Diru pli bone la penso trovi la necesan monon por partopreni la balon.

M. Kaj ni devas ĝin havi, ĉu vi komprenas ? Kunfalu la ĉielo, ni devas ĝin havi !

N. Mi aŭdis : estas de post hodiaŭ matene ke vi ripetadas vian diron ; ni komencis kun cent liroj, kiujn post herculesaj klopodoj, ni malpliigis nur al kvindek.

M. La minimumo.

N. La eta minimumo, sed kun la aldono de du nigraj vestaĵoj.

M. Jes, kaj mi ripetas ke ni devas ilin trovi, eĉ se ni devus renversi la mondon. Ni devas trovi tiujn malbenitajn kvindek lirojn. Monbijou atendas nin je la deknaua kaj ŝi certigis min ke, se hodiaŭ vespere mi ne venos, ŝi trovos tuj anstataŭanton: kiel vi vidas, ultimato laŭ ĉiuj reguloj.

N. Kaj Marietta, kiu demandis al mi ĉu estas vere ke esperantistoj post balfesto kutimas ĉiam trinki ĉampanon?

M. Kaj vi, malfeliĉulo, ĉu vi eble jesis?

N. (*malespera*) Jes!

M. Tiam ni estas perditaj!

N. Sed, ni ne perdu nian tempon en vanaj babiladoj. Memo, kioma horo estas?

M. Mia rigardo ne iras ĝis la publika pruntejo.

N. Vi estas prava, mi forgesis. Vidu, do kion ni povus vendi ĉi tie.

M. La najlojn de la pargeto, la morteron de la plafono kaj la haŭton, kiu nin kovras: nenio alia estas ĉi tie.

N. Ne ŝercu ; ĉu ni povus eble vendi ĉi tiun pentraĵon ?

M. Jes, se estus iu, kiu ĝin aĉetus. Sanktaj diaĵoj ! Ĉu vi ne scias ke antaŭhieraŭ mi portis ĝin al komercisto dirante : Jen bona negoco por vi : pentraĵo sur tolo. Bone, ĉu vi scias kion li faris ? Li turnis la pentraĵon, ekzamenis bone la tolon kaj poste respondis : Estas tolo de lasta kvalito, neniuj aĉetus ĝin po unu liro metre. Eble ni vendu la gitaron ?

N. Sed ĝi ne estas mia, kaj cetere la ĉarpentisto ne akceptas ĝin, ĉar estas tro da feraĵo sur ĝi kaj la forĝisto ne volas ĝin aĉeti ĉar...

M. ...estas tro da lignaĵo. Kaj tiel pasas la tempo kaj ni devas tiun vesperon partopreni la balfeston.

N. Certe, sendube : diablo ! Nia foresto malutilus la prestiĝion de la arto.

M. Kaj la amon de niaj virinoj ; kvindek liroj kaj du nigraj vestaĵoj : sed kiu donas ilin al ni ? Kiu ?

N. Memo, ideo !

M. Ĉu ideo en via kapo ? Ne estas eble., sed ni aŭdu.

N. « Ultima ratio », lasta ankro, lasta espero !

M. Rapidu !

N. Ni petos prunton al dommastrino.

M. (*emfaze*) Moses batis la rokon kaj el ĝi elsprucis akvo, sed se vi intencas bati sinjorinon Filomena'n, mi diras al vi tuj, ke se ŝi multe trinkis, eble akvo elsprucos, sed mono... Estus la sama afero kiel iri ĉe mia onklo kanoniko.

N. Kaj mi diras al vi ke per paro da allogaj paroloj, per ĝentila rideto....

M. Alion bezonas ol ridetojn kaj belajn parolojn tiu avarulino. Ne estas la unua fojo ke ni petas ŝin por prunto havante ĉiam la saman respondon: (*ŝanĝante voĉon*) Kia herezo ! kia herezo ! Peti monon al mi, malriĉa vidvino: se estus ĉi tie mia mortinta Prosdocimo, li povus diri al vi ke.... Almenaŭ ni havus glaseton da likvoro: la « triple sec » estas la unika ŝlosilo por malfermi ŝian monujon.

N. Estas vere, sed ni klopodos. (*alvokante*) Sinjorino Filomena ! sinjorino Filomena !

SCENO II_a

F. Ĉu vi alvokis min? Mi estis en la kuirujo por gladi la tolaĵon: estas vera mal-espero tiu gaso, kiu kostas ĉiutage pli kaj brulas ĉiutage malpli. Ĉu vi aŭdis? El la unua de la venonta monato dekkvin centimojn pliigo la kuban metron, kaj tiel oni atendas pri la viando, la terpomoj, la salato: kiamaniere ni finos, Dio sola scias.

N. Neniaĵo por vi, kiu havas ion, sed por ni....

F. Kia herezo! Ĉu mi posedas ion? Paronda ĉifonoj kaj sufiĉas.

N. He! ne diru ĉi tion al mi. Se ĉiuj najbaroj diras ĉiam unuvoĉe: Sinjorino Filomena, tiu estas virino kiu vivas bone, tiu jes.... kaj la pordistino aldonis: Sub ŝtono kuŝas kankro.

M. Ne dirante ke bela virino havas ĉiam la esperon fari bonan edziĝon. Ĉu vi eble kuraguŝu diri, ke muŝviroj ne zumas ĉirkaŭ vi?

F. Pro mia mono, ĉu vere?

M., N. Ne, ne, kiu diras ĉi tion?

M. Ne pro via mono, sed ĉar vi estas virino bela, sprita, juna...

F. Ho, pri juneco ne parolu: je sankta Luko mi finas miajn tridekses jarojn.

N. Ĉu vi ŝercas? Vi tridekses jarojn? Mi opiniis maksimume dudekok.

M. Kaj mi dudekses: ŝnela, eleganta, vivo-plena: ĉu ne estas vere ke vi ne vin ŝanĝus kun deksexjara fraŭlino?

F. Vere! Min ŝanĝi kun tiuj senplumaj kokinetoj! Ne, ne!

M. He, mi tion diris: vi estas prava.

F. Sed aŭdu, kion vi volas de mi? Mi opinias, ke vi ne alvokis min ĉi tie por min amindumi. Mi sentas en la aero ke vi bezonas ion: kuraĝu!

N. Kiom inteligenta estas sinjorino Filomena; al ŝi sufiĉas rigardo por kompreni ĉion: ŝi legas en la okuloj la penson, funde ĝis la animo.

M. Estas vere: sinjorino Filomena, vi divenis: ni volas peti al vi ion, malmulte, memkompreneble.

F. (*sidante*) Parolu.

M. Vi scias ke hodiaŭ vespere estas la granda balfesto de la esperantistoj.

F. Jes, mi legis en la ĵurnalo, kaj vi volas ke ankaŭ mi partoprenu ĝin : ne, miaj knaboj, mi ne dancas plu ; mi promesis al mia mortinta Prosdocimo....

N. Ne, sinjorino Filomena, ne estis tio : ni scias tre bone, ke vi ne dancas plu, afero cetere malbona, sed ĉiu promeso estas sankta kaj oni bezonas ĝin gardi.

M. Certe.

N. Ni volis diri al vi, ke ĝis nun ni atendis la alvenon de nia kliento, kiu certigis nin, alporti kvindek lirojn kaj....

F. Mi komprenis, mi komprenis. Kia herezo : peti monon al mi, al malriĉa vidvino : sed kie mi prenos ĝin ? Diru vi, kie ? Se estus ankoraŭ viva mia kara Prosdocimo, li povus diri al vi, ke ĝis kiam mi povis, mi helpis ĉiujn : mi donis ĉion senpage iam, sed nun je la malfacilaj tempoj.... Hodiaŭ, karuloj, vi trompis vin. Mi kredas ke ne eĉ la ministroj de la financoj kapablas eltiri el mi unu centimon.

M. He, sinjorino Filomena, finfine estas mal multe : kvindek mizeraj liretoj kiujn ni promesas redoni la....

- F.la tridekan de februaro : ĉu vi scias, ke vi ŝuldas al mi ankoraŭ du monatojn de ludepago?
- N. Kiun ni sendube pagos : ĉu ni eble forkuris aŭ ni havas la ideon... ?
- F. Vi ne forkuras ĉar vi scias ke nenie vi trovos dommastrinon pli bonan ol mi.
- M. Vere : do, sinjorino Filomena, vi kiu estas tiom bona, helpu la arton kaj via nomo restos en la mondo de la artistoj senmortema.
- F. Ne eĉ songe ! Kia herezo, peti al mi monon kaj je la fino de la monato. Ne, ne, ne ! (*iras al elirejo*) Ĝis revido.
- N. Sed ne foriru ! Ĉu vi ne komprenas, ke ni ŝercis ?
- F. Sed vi parolis tiom serioze, ke mi vere timis.
- N. Ne timu pro simila malgranda afero, sinjorino ; ni volis peti de vi nur....
- F. Ho, ion alian nun ; kion vi volis peti de mi ?
- N. Ĉu por hodiaŭ vespere vi povus prunti al ni tiun nigran vestaĵon....
- F.la nigran vestaĵon de mia Prodocimo por iri al balfesto ? Sed estas vera profanado ! Li, kiu ĝin survestis nur por iri al

unua meso, kaj vi volus ĝin havi por danci la roks-drops aŭ kiel estas nomataj tiuj dancoj, kiuj estas la vera pereco de la junularo. Vi estas frenezaj, miaj karuloj (*reiras al elirejo*).

M. Sed, ĉu vi ne havas alian nigran vestaĵon? Ne estu tiom malbona kun ni, sinjorino, vi scias kiom ni vin amas.

F. Se mi povas fari agrablaĵon, mi neniam diras ne, vi jam scias: sed kiujn aliajn nigrajn vestojn mi havas?

M. Pensu eble... vi posedas tiom da roboj...

F. Tiom, tiom, vere ne.

M. Pensu, sinjorino.

F. (*post paŭzo*) Mi havus, mi havus paron da nigraj pantalonoj de mia avo Aristodemio. Hieraŭ ordigante la vestejon, mi trovis ilin: sed mi devas diri al vi, ke ili estas iomete eluzitaj ĉe la postaĵo: mia avo, kiel vi scias, sidis preskaŭ ĉiam kaj dum la lastaj jaroj la malfeliĉulo perdis la uzadon de la kruroj.

M. Bone por la pantalonoj de la avo, se ne estas io pli bona.

F. Pli bona, pli bona: ili estas el multekosta

ŝtofo; iom eluzitaj sed ankoraŭ tre bonaj; nun ke la gladilo estas ankoraŭ varma, mi glados ilin. Ho, kiom da laboro pro vi; sed por vin vidi kontentaj.... (*eliras*).

M. Ke Jupitero sendu la kokluŝon al vi, al Prosdocimo, al avo Aristodemo! Vidu vi, kiu havis la egan ideon peti monon de sinjorino Filomena: eble, eble paron da pantalonoj malpuraj, malnovaj, ĉifonitaj, por kiuj estos necesa la juĝo de Salomono: duono al vi kaj duono al mi.

N. Mi kredas ke sub la ĉielo ne ekzistas du viroj pli malfeliĉaj ol ni. Memo, mi iras en monaĥejon.

M. Lasu la monaĥejon kaj iru pli bone ĉe profesoro Voronof por inokuligi al vi la simian glandon, tiel eble via fantazio ekvekiĝos kaj vi trovos ion pli bonan ol sinjorinon Filomenan por forsaltigi la kvindek lirojn.

N. Se ni irus ĉe via onklo kanoniko?

M. Dio gardu! Ĉu vi ne scias, ke li dirigis al mi, ke se mi kuraĝas ankoraŭ unu fojon peti de li monon, li sendus al mi la ekskomunikon « magna »?

N. Kaj tiel pasas la tempo, alproksimiĝas la vespero kaj ni estas ĉiam je la sama punkto. Ho, diaĵoj kuŝantaj sur Olimpo, helpu vi nin! (*oni forte frapas la pordon*). Kiu estas nun?

M. Eble la diaĵoj kuŝantaj sur Olimpo, kiuj portas al ni la monon. Rapidu, malfermu!

N. Estas la kelnero, kiu hodiaŭ matene solene deklaris, ke se ni ne pagos dum la tago, li venos....

M.por nin sekvestri eble? Malspritulo, ĉu vi ne komprenas ke jam la tuta mondo scias ke al sekvestro eble nur la vendisto de azena viando aĉetus nin je unu liro kaj dudek kilograme? (*oni frapas pli forte*) Ĉar vi ne kuraĝas malfermi, malfermos mi.

SCENO III^a

J. (*eniras ceremonie sed kun la ĉapelo sur la kapo: cetere kiel li povus fari alimaniere se li kunportas du pezajn valizojn?*) Bonan tagon, sinjoroj, bonan tagon.

M., N. Bonan tagon, sinjoro: en kio ni povas vin servi?

J. Mi havas la honoron min prezenti: mia nomo estas John Reith Ĉing Spic....

M., N. Sanon! Feliĉon!

J. Dankon, dankon, sed estas nur mia nomo John Reith Ĉing Spic Punk: mi venas el Porkopolis, ega urbo *of United States of North Amerika*.

M. Bonalvenon, lordo, feliĉega konatiĝi kun vi: mi estas Memo, akademia pentristo, specialisto por la nudo, kaj amiko Nando....

N.muzikisto, aŭtoro de la fama romano: La mondo turnas sep fojojn sep.

J. Bone, vi sinjoro, faris jam la vojaĝon ĉirkaŭ la mondon kvardeknaŭ fojojn, sed mi venas la unuan fojon al Europo, ĉar mia komerco en porka viando malpermesis al mi longan foreston el mia urbo.

M. Tre bone: antaŭ ĉio la negocoj.

J. *Allright*, sinjoro, *bissnes*. Mi estas la unika posedanto de grandaj fabrikejoj por la eksporto de porka viando: mia patro estis ankaŭ granda komercisto en porkoj, mia avo ankaŭ: ni ĉiuj estas anoj de familio....

M.porka. Bonege, miajn gratulojn.

J. Dankon, nur kuzo ne volis komerci, pro

tio mia avo aĉetis por li doktoran diplomon de la Oriental University en Washington por la malgranda sumo de 106 dolaroj; sed la kuzo fariĝis pli azeno ol antaŭe: ne volis komerci en porkoj...

N.kaj restis azeno, memkompreneble.

J. Mi venis do al Eŭropo pro du gravaj motivoj.

M. Tio estas: unue havi de mi belan penetraĵon: tiel en bela pozicio kun porketo sur la brako kaj alia pli granda apud la piedoj...

N.kaj himnon de mi, kiu igos vin...

J. Ne, ne, sinjoroj, pro aliaj motivoj. Mi likvidis mian tutan komercon kaj realigis kapitalon de 350 milionoj de dolaroj (*grandaj okuloj de M. kaj N.*).

M. Sidu, Ekscelenco, mi petas vian Moŝton, faru ĉion, kion vi deziras, tute senĝene.

N. Sidu, lordo, sidu; eble via Ekscelenco estas laca.

J. Dankon: mi venis al Eŭropo, ĉar amerika parlamento malpermesas nun la alkoholajn trinkaĵojn kaj mi ne povas vivi sen botelo de viskio.

M. Kiu kruela leĝo! Sed kial oni malper-

mesas la agrablan trinkadon de viskio, kiu estas tiom bona?

J. Ho, jes, *very well*: tre bona. Kaj dua motivo ankaŭ tre grava: mi intencas edziĝi.

M. Bela, laŭdinda ideo por ĉiuj diaĵoj: ne dubu, lordo, ke ni trovos taŭgan fraŭlinon por vi: bonan, belan, bravan, inteligentan, honestan.

J. Mi dankas, sed mi jam trovis. Antaŭ unu monato mi legis en via ĵurnalo ke fraŭlino serĉas edzon: mi skribis, fraŭlino respondis tuj per bela letero kaj nun mi venis al Eŭropo por kunpreni la fraŭlinon, kiu devas loĝi en ĉi tiu domo. Mi demandis en ĉiuj loĝejoj, sed neniu scias ion, pro tio mi venis en la lastan etaĝon.

M. Kiel? Ŝi loĝus ĉi tie?

J. Jes (*eltiras leteron*): ĉu ne estas ĉi tie la vojo Karo Pison?

N. Jes, vojo Carpiŝon.

J. Bone, tiam ŝi devas loĝi ĉi tie: fraŭlino skribas ke ŝi vivas sola kun maljuna onklino tre severa, kiu ne permesas al ŝi nek eliri, nek paroli kun viroj; la fraŭlino estas nomata Izidora.

N. Sed ne loĝas....

M.(al N.) Silentu, malsaĝulo, aŭ mi disrompas al vi la vertebraron! (al J.) Mi konas ŝin, mi konas ŝin! Ŝi loĝas en la kontraŭa loĝejo: vi havis vere bonŝancon veni ĉe ni, ĉar se vi estus irinta direkte al ŝi, la onklino certe vin ne ricevus: vi estis vere feliĉa veni en nian loĝejon.

J. Dankon, mi petas vin, sinjoro, bonvolu min helpi.

M. Certe, certe: mi estas tute al via dispono: sed mi atentigas vin, ke antaŭ ĉio ni devas paroli kun la onklino, sed por tio mi pensas; sufiĉas ke vi nur... (*frotas la dikan kontraŭ la montra fingro*).

J. Ĉu dolaroj?

M. Jes.

J. Mi estas preta doni kion vi volas.

M. Mi venigos ŝin: vi vidus ke ĉio iros bone kaj ke Izidora estos feliĉa havi edzon kiel vin.

J. Dankon, sinjoro, dankon. Mi petas, bonvolu diri al mi, ĉu fraŭlino estas bela.

M. Idealo, venuso. Ŝi havas du okulojn, kiuj estas du sunoj.

J. Ĉu du okuloj? Bone, kaj kiom grandaj?

- M.** Tiom grandaj: du orelojn tiom grandajn, du nazojn....
- J.** Ĉu ŝi havas du nazojn?
- M.** Ne, pardonu, nur unu, mi konfuziĝis. Sed fraŭlino Izidora havas tiom da belaj aĵoj kaj en tiom granda nombro.
- J.** *Allright!*
- M.** Ŝi havas du manojn, kiuj estas tiel....
- J.** Tre bone, al mi plaĉas grandaj manoj kaj ankaŭ grandaj piedoj.
- M.** Du veraj barkoj.
- J.** Mi estas vere feliĉa!
- N.** Mi kredas, mi kredas.
- J.** Mi petas, diru al mi la koloron de la haroj.
- M.** Koloron tiel, tiel....
- J.** Kiu estas la koloro tiel?
- M.** Jen, inter nigro kaj blondo.
- J.** Mi komprenas: ŝi havas unufanke nigrajn kaj aliflanke blondajn harojn.
- M.** Prave: tial; kiam vi deziras ŝin blonda, vi turnas ŝin dekstren, kiam vi deziras ŝin nigra, maldekstren.
- J.** Mirinda virino; mi petas, venigu ŝin tuj ĉi tien.

- M.** Mi kuras kaj en kvin minutoj mi revenas kun ŝi (*al N.*). Nando, la bonŝanco estas en niaj manoj; gardu ĝin se vi havas ankoraŭ ion sanktan en vi.
- N.** Ne dubu: mi ne forlasos ĝin (*M. eliras*).
- J.** Sinjoro, ĉu vi estas muzikisto?
- N.** Jes, lordo, mi estas instruisto de gitaro: mi studadis ĉe la konservatorio kaj ĉe la liceo: sed la aferoj iras tre malbone je la nunaj tempoj...
- J.** Certe, la tempoj estas tre malfacilaj por muzikistoj: komereu ankaŭ vi en porkoj; ni malfermos ĉi tie filion.
- N.** Estus la plej bona afero.
- J.** Dum la ekspozicio de Filadelfia mi vidis la plej grandan gitaron de la mondo; ĝi estis longa 785 metrojn.
- N.** Ĉu gitaro longa 785 metrojn?
- J.** Jes, la muzika karto longa 600, alta 530: la muzikisto devis veturi por aeroplano por legi la notojn kaj informis telefone la maŝinistojn, kiuj movigis la kordojn per elektraj kranoj.
- N.** Mirinde, kaj la publiko, kie ĝi estis?
- J.** En la gitaro mem: la koncerto komen-

ciĝis je la sesa matene kaj finiĝis je tagmezo ; rekomenciĝis je la dua..

N. ..kaj finiĝis je noktomezo.

J. Ne, je la dekdua vespere. Oni devis pagi por la unuaj sidlokoj 200 dolarojn, por la duaj 150, ĝis la dek sesaj, kiujn oni pagis 50 cendojn.

N. Sed devis esti spektaklo vere amerika.

J. Ho, jes ; nur Ameriko estas kapabla fari tiajn aĵojn : dum la unua koncerttago kvar personoj freneziĝis kaj dekkvin fariĝis surdaj.

N. Malproksimen, malproksimen !

J. Jes, oni povis veturi tre malproksimen eĉ per motociklo sur la gitaro.

SCENO IV^a

M. (*ekstere*) Ĉu oni povas eniri ?

J. Estas sinjorino onklino : enirigu ŝin tuj, mi petas.

N. Eniru, eniru !

M. (*eniras vestante longan virinan vestaĵon*) : Bonan tagon, sinjoroj : oni diris al mi ke fremda sinjoro deziras min alparoli.

J. Jes, sinjorino, estas mi : mia nomo estas John Reith Ĉing Spie Punk el Porkopolis, granda komercisto kaj posedinto de fabrikejo por la eksportado de porkaj viandoj : nun post la likvido de mia komerco mi venis al Eŭropo.

M. Tre feliĉa vin koni, sinjoro Ĉinĉin Pum, tre feliĉa. Viaj porkaj viandoj devas esti bonaj, ĉu vere ?

J. Tre bonaj, sinjorino. Se vi permesas, mi sendigos al via moŝto specimene 25 ŝinkojn de ĉiuj niaj 72 kvalitoj.

M. Dankon, mi estos vere dankema al vi ; mi ekgustumos ilin tre volonte.

M. (*inter si*) Diablo ! Ekgustumi 1800 ŝinkojn : kian ventriklon devas havi tiu sinjoro..., pardon... tiu sinjorino.

J. Mi telegrafos tuj al mia sekretario por ke li sendu ekspresan vagonon.

M. Dankon ; nun bonvolu diri al mi la motivon de via Alvoko.

J. Sinjorino, mi ricevis leteron de fraŭlino Izidora.

M. Ho, la koketulino ! Ŝi skribis leteron al sinjoro sen mia scio : mi, kiu estas por ŝi

kiel dua patrino kaj zorgas por ŝia bona reputacio!

J. Nenio malbona, sinjorino, ĉar mi havas la plej bonajn intencojn: mi venis el Porkopolis por konatiĝi kun fraŭlino: bonvolu permesi ke mi alparolu ŝin: mi faros al ŝi mian amdeklaracion kaj mi kondukos ŝin al Anglujo, ĉar mi ne intencas reveturi Amerikon.

M. Ne estas tiom facile kiel vi opinias, kara sinjoro; kun la tuta estimo kiun mi havas por vi, mi devas vin atentigi ke ĉe ni fraŭlinoj de bonaj kaj honestaj familioj ne ĝuas ian ajn liberecon (Dio pardonu al mi la mensogon!); ili ne estas liberaj kiel en Ameriko.

J. Mi respektas la leĝojn de la lando, sed se vi permesas ke mi parolu kun fraŭlino Izidora, mi donos al vi grandan trinkmonon.

M. Sed, sinjoro, vi ofendas min: en Eŭropo trinkmonoj ne estas konataj (*sin turnas rapide kaj forpuŝas la dekstran manon agitante la fingrojn*).

N. (*al orelo de J.*) Kuraĝu, lordo, estu malavara kaj ĉio iros bone.

J. (*prenas el la valizo pakaĵon da banknotoj sur kiu oni vidas la belan ĉiferon de 100.000 kaj metas ĉiujn en la manon de M.*) All-right! (*M. retiras tuj la dekstran manon, forpuŝante samtempe la maldekstran; N. saltas tiel ke la plej facilmoŝa kapreolo en-vius lin*). Ho, en Eŭropo trinkmono estas ne konata! (*metas alian pakaĵon en la dekstran manon de M., kiu memkompreneble forpuŝas tuj ree la dekstran*). Sed kiom da manoj havas tiu sinjorino? Ĉu ŝi estas virino aŭ simio? Dio gardu se en Eŭropo oni permesus akcepti trinkmonojn.

N. (*al M.*) Turnu! Blovas malfavora vento.

M. (*sin turnas; kun indiferenteco*) Ni diris do, se mi bone memoras, ke sinjoro deziris paroli kun mia Izidora: mia konscienco, verdire, ne permesus, sed al sinjoro tiom ĝentila, nenion oni povas rifuzi. Mi venigos ŝin tuj ĉi tien, eĉ, por montri al vi mian tutan konfidon, mi petos sinjoron (*al N.*) veni kun mi por ke vi ne havu ian ajn embarason malfermi vian tutan koron al mia kara Izidora (*kondukas for N., kiu krias: Kiu kapablas min haltigi en tiu mo-*

mento ?) Silentu, malspritulo ! Ni kuru tuj ĉe Monbijou kaj kondukos ŝin ĉi tien baptitan kiel Izidoran.

J. Adiaŭ, sinjoro ; venigu, mi petas, tuj la fraŭlinon.

M. Estos necese ke mi informu ŝin tute singardeme : havu iomete da pacienco (*eliras kun N.*)

J. (*sola*) Kaj nun unue kison al mia dua fianĉino (*eltiras botelon de viskio kun du glasetoj, kiujn li metas sur la tablon*). Ni en Ameriko faras ĉiam tiel : ĉar tiamaniere viro kuraĝas pli kun virino kaj virino kun viro.

SCENO Va

F. (*eniras tenante paron da pantalonoj en la manoj*) Kaj nun trovu dommastrinon pli bonan ol min.

J. (*ĝetas sin genue*) Izidora, mi amas vin per ĉiuj fortoj de mia koro !

F. (*kun granda teruro*) Helpu ! Karabinjeroj ! Fajrestingistoj ! (*kuras tra la ĉambro ; J. sekvas ŝin genue*).

- J.** Vi estas mia idealo, ne timu! Ne estas bezono de fajrestingistoj, ĉar mia koro brulas senflame!
- F.** Sed kiu estas vi? Kion vi volas de mi?
- J.** Amon, mi volas!
- F.** Sed el kie vi venis? De kiam vi estas ĉi tie?
- J.** Mi venis el Ameriko (*ekstaras*). Mia nomo estas John Reight Ĉing Spic Punk.
- F.** Dio kaj la sankta Virgulino defendu min.
- J.** Mi vendis miajn grandajn fabrikejojn por la eksportado de porkaj viandoj kaj nun mi venis al Eŭropo por edziĝi kun vi.
- F.** Ĉu edziĝi kun mi? Sed ĉu mi frenezigaŝ aŭ vi? Mi neniam vin vidis.
- J.** Ne eĉ mi vidis vin iam, sed mi scias ke vi estas bona, brava....
- F.** Prave, sed ke la famo pri mia boneco iris ĝis Ameriko, mi iomete dubas.
- J.** Mi forveturis el Ameriko pro du motivoj: unue ĉar leĝo ne permesas plu la trinkadon de alkoholaĵoj kaj al mi plaĉas tre multe la viskio.
- F.** Ho, mi trinkas ĝin ankaŭ tre volonte.
- J.** *Allright!* tio faras al mi grandan ĝojon: mi havas valizon plenan de boteloj (*prezentas al ŝi glaseton, kiun F. trinkas avida*).

F. Tre bona, vere unua kvalito.

J. Jes, *very good*.

F. Kaj diru, ĉu ankaŭ la alia valizo estas plena de boteloj?

J. Ne, alia valizo enhavas ĉiujn miajn kapitulojn : mi kunportis 350 milionojn de dolaroj.

F. Kiel? Kiel? En tiu valizo estas 350 milionoj de dolaroj?

J. Jes, rigardu, mi petas.

F. Mia Dio, mi sentas malvarman ŝviton : dum mia tuta vivado mi neniam vidis tiom da mono ; kaj kion vi faros per ĝi?

J. Mi jam diris, mi edziĝos kun vi.

F. Ho, mia kapo ! Ŝajnas al mi kvazaŭ apopleksio devus min trafi ; donu al mi alian glaseton.

J. *Allright!* Alian glaseton : ni trinkos dek botelojn hodiaŭ : vi vidos ke ĝi estas bona. Mi havas ĉi tie *wisky, gin, cognac, sherry, brandy, triple sec, jamaika, curaçao, benedictine, griotte, kummel, chartreuse....*

F. Sed vi estas la viro plej ideala, vi estas vere vivanta likvorejo !

J. Izidora, vi bone parolas : mi estas ideala viro por vi kaj vi ideala virino por mi.

F. Ĉu mi songas?

J. Unue trinki bone kaj poste songi: ŝajnos al vi flugi ĉielen. Mi petas alian glaseton.

F. Donu, donu.

J. Mi pensis pri vi dum mia tuta vojaĝo kaj mi estas tre kontenta min trovi ĉi tie: al via sano alian glaseton.

F. Al nia sano: vivu!

J. Vivu ĉiam mia Izidora, kiu igos min la plej feliĉa viro de tuta Ameriko!

F. Ĝis kiam restas al mi ankoraŭ ero da klareco, permesu ke mi rigardu ankoraŭ unu fojon en la valizo.

J. Mi petas, rigardu: ĉiuj pakaĵoj estas de 100.000 dolaroj: prenu kiom vi deziras, ĉar ĉio apartenas al vi: vi posedas ĉion, ankaŭ vian John!

F. Ho ve! Mi sentas ree kapdoloron.

J. Tuj alian glaseton: ĝi mortigos ĉiujn bestojn, kiujn vi havas en la kapo.

F. (*ridetante*) Prave: ŝajnas al mi havi egan kankron ĉi tie en la cerbo, kiu premas min tiel. Sed diru, sinjoro John, kiel vi konis min?

J. Mi por mia Izidora ne estas sinjoro John diru mia kara John, *my dear John*.

- F. Bone kiel vi deziras, mia kara John :
diru kiel vi konis min ?
- J. Mi ricevis leteron, kiun vi sendis al mi
al Porkopolis.
- F. Sed mi neniam skribis al vi.
- J. Mi komprenas, vi skribigis per via se-
kretario.
- F. Ĉielo ! Mi sekretarion !
- J. Ĉu vi ne skribigis per via sekretario ?
Ne gravas ; mi amas vin kaj vi amas min :
vi fariĝos mia edzino kaj mi via edzo. Al
nia feliĉo, alian glaseton.
- F. (*iomete ebria*) Vivu John !
- J. Vivu mia Izidora ! Mi estos ĉiam bona
edzo. Nur du aferojn mi amas sur la mondo :
mian Izidoran kaj botelon de viskio. Nun
mi parolos pri la preparoj de nia edziĝo....
Diru kion vi deziras : mi aĉetos por vi ves-
taĵojn, ĉapelojn, veturilojn, aeroplanon.
- F. Jes, mia kara John, kion vi deziras. Ni
veturos kien vi volas (*ĉirkaŭprenas J.*)
- J. Mi venigos el Parizo tajlorinon por fari
al vi vestaĵojn el veluro kun longaj ruban-
doj, kiel estas nun moderne. Ĉu vi deziras
fari edziĝan vojaĝon al Londono ?

F. Londono? Sed estis ĉiam mia revo viziti tiun mirindan urbon: jes, ni veturos Londonon.

J. Mi aĉetos por vi vilaon, al kiu ni donos la nomon Izidora; poste belan ĝardenon plenan de floroj: vi havos ĉambristinon, nutristinon....

F. Ho, pri nutristino....

J. Jes por nia malgranda *baby*: ĉu vi ne ĝojus havi infanon? Glaseton por nia estonta *baby*.

F. Tiam vivu nia malgranda *bebé*: vivu John! Vivu Ameriko! Mi estas vere feliĉa.

J. Mi ankaŭ estas vere feliĉa. Nun ĵuru al mi senfinan amon.

F. (*montrante tri fingrojn*) Mi ĵuras, ĵuras kaj ĵuras ke mi amos eterne mian John, sole John, nur mian John, kaj tiel Dio helpu min!

J. Ankaŭ mi ĵuras ke mi amos ĉiam mian Izidoran.... Kaj nun glaseton por nia ĉiama feliĉo.

F. Kiam ni edziĝos, John?

J. Morgaŭ ni subskribos la kontrakton kaj poste ni iros en la preĝejon, se vi tion deziras.

- F.** Kaj ĉu vi amos min ĉiam? ĉiam?
- J.** Amerikano havas nur unu parolon, kiam li diras jes; tio restas dum la tuta vivo. Mi petas glaseton por nia tuta vivo! (*F. duonebria apogas la kapon sur la ŝultron de J. kaj restas tiel.*).

SCENO VI^a

- M., N., Mb.** (*eniras piedpinte: M. kaj N. estas tre elegantaj en siaj novaj frakoj; Mb. survestas robon, kiu estas vera mirindaĵo.*).
- M.** Kion vidas miaj malhelaj pupiloj! Filomena, kiu konkeris Amerikon! Monbijou, vekigu ilin!
- Mb.** Kiel estas mia nomo? Teodora, ĉu vere?
- M.** Ne, besto, Izidora: ĉu vi komprenas? Izidora!
- Mb.** (*saltetante*) John Ĉinĉin Pum; jen via Izidora: jen la virino, kiu freneziĝas por vi!
- J.** Kiu vi estas fraŭlino?
- Mb.** Mi estas via malgranda Izidora, kiu sendis aron da leteroj al vi en Porkopolis.
- F.** Ohé! Kiuĵ aferoj estas tiuj? Atentu ke ankaŭ mi estas ĉi tie. John estas mia kaj

nenia forto de la mondo forprenos lin de mi.
M., N. Ho, ho! De kiam vi estas nomata Izidora?

F. De kiam mi naskiĝis: iru al preĝejo de sankta Antono kaj vi vidos ke estas skribite Izidora Barbara Filomena!

M. La mirindaj nomoj!

J. Jes, tre belaj nomoj, sed mi nomos vin ĉiam nur Izidora.

Mb. Izidora estas mi; mi skribis al vi al Ameriko.

F. Ĉu vi volas silenti kun tiuj sensencaĵoj? Vi, malinda virinaĉo, aŭ kiel estas vere ke ekzistas Dio, mi....

M. N. Ĉu eble estas okazonta duelo?

J. (*serioze*) Ne duelo, mi petas; pli bone bokso amerikana.

Mb. Maljunulinaĉo: ĉu vi volus havi John?

J. (*kviete*) Diru, fraŭlino, kiel vi estas nomata?

Mb. Izidora.

F. Kaj via antaŭnomo?

Mb. (*embarase*) Izidora... Monbijou.

F. Bone: John, elprenu la leteron, ke ni vidu.

J. (*legante*) Izidora Trippetta.

F. Ho, Trippetta....

N. Kiu estas ŝi?

F. Mi scias, mi scias kiu estas Trippetta: ŝi estas malĉastulino, kiu forkuris eksterlanden kun skafandrulo.

J. Nun ŝi estas eksterlande: ni ne parolos plu pri ŝi: nun restas ĉi tie du Izidora'j.

Mb. Mi, mi, kara John, kiu amas vin tiom.

F. Ne tuŝu mian proprajon, mi rediras al vi. Ĉu vi ne legis la leteron? Foriru! For, for!
(okazas terura konfuziĝo: ĉiuj krias laŭte: nur J. kviete kaj trankvile atendas la finon de la uragano).

N. Memo, ni perdis la partion; ni alvenis tro malfrue.

M. Silentu! Silentu! Lasu, ke mi parolu!

J. Jes, parolu vi, sinjoro pentristo.

M. Sciu, ke tiu fraŭlino forlasis ĉion por renkonti Mister John kaj ni esperas ke li, obeante la leĝojn de la lando...

J. Jes, mi obeos ĉiam la leĝojn de la lando.

M. ...pagos almenaŭ kompenson al fraŭlino.

F. Jen la grandaj amoj de fraŭlino: pagi, pagi!

N. Sinjorino Filomena, almenaŭ pri tio vi

ne devus nin kontraŭparoli: nun vi estas la plej feliĉa virino en la mondo.

F. Jes, certe, ĉar John ĵuris al mi eternan amon.

J. Jes, mi ĵuris: amerikano havas nur unu parolon, sed, obeante la leĝojn de la lando, mi pagos kompenson.

Mb. Dankon, ĉar hodiaŭ mi havas egan bezonon: mi volas esti la plej bela hodiaŭ vespere al balfesto de la esperantistoj.

J. Kiel esperantistoj? Ĉu vi estas esperantistoj?

M. Jes. Ĉu estas eble ankaŭ vi, mister John?

J. Certe, mi estas esperantisto.

M., N., Mb. Tiam nia samideano!

M. Sed kial vi ne portas la distingilon?

J. Kiel? Kiel? Ĉu mi ne havas distingilon?
(*malbutonumas la jakon montrante egan esperantistan stelon*).

M., N., Mb. Vivu nia samideano!!

F. Vivu mia John!

J. Kaj nun, ke ni estas ĉiuj gefratoj, ni formas grandan familion kaj ni devas vivi en paco. Mi pagos tuj kompenson al fraŭlino (*donas al ŝi pakaĵon de banknotoj*).

Mb. Dankon, dankon, lordo! (*ĉirkaŭprenas lin turnigante*).

J. Vi estas knabino farita el saltetanta materialo: nun mi helpos ankaŭ ĉi tiujn karajn samideanojn, kiuj certe morgaŭ faros al mi agrablaĵon.

M., N. Certe. Kion vi deziras, lordo?

J. Mi deziras, ke vi estu la atestantoj al mia edziĝo kun mia Izidora.

M., N. Tre bone! Vivu la estontaj geedzoj!
Vivu Filomena Barbara Izidora!!

J. Vivu ŝi ĉiam! Prenu, sinjoroj! (*donas al ili pakaĵojn*).

M., N. Dankon, dankon, samideano! Vivu Ameriko!

F., J. Vivu! Vivu!

N. Pensu, Memo, ni estas preskaŭ milionuloj: jen mi levas la manon kaj mi tuŝas la ĉielon per la fingro!

M. Vi sola, Esperanto, povas fari tiajn miraklojn! Vivu ĉiam via verda vizaĝo!

Ĉiuj. Vivu!

J. Mi ankaŭ kun mia Izidora deziras partopreni la esperantistan balfeston.

M., N., Mb. Brave! Bone! *Allright!!*

J. Kaj poste granda komuna vespermanĝo kiel ni kutimas en Ameriko: ĉampano de-vas flui kiel rivero.

M., N., Mb. Brava John!!

J. (*sin turnas al publiko*) Se estas ĉi tie aliaj samideanoj, ili bonvolu partopreni nian vespermanĝon: mi pagos por ĉiuj. Venu kaj konduku ankaŭ viajn familianojn, amikojn, konatulojn.

M. Ne forlasu la bonan okazon: venu!

J. Antaŭen! *Allright!!* (*prenas la brakon de F., kiu kaptas la valizon enhavantan la monon. N. ludas la gitaron; Mb. prenas la botelon, M. la paletron kaj batas ĝin per la penikoj, kaj kun grandaj bruoj ĉiuj eliras*).

F I N O



Prezzo It. L. 1.50